Тарас Григорьевич Шевченко ,

Testamento

tradukita de Ludmila Novikova

Kiam mortos mi, amikoj,
Mian tombon faru
En la stepo larĝe vasta
De Ukrajno kara.
Por ke vidu mi la valojn,
Dnepron, krutajn bordojn,
Por ke aŭdu mi muĝantajn
Pro impeto ondojn.

Kiam sangon malamikan
For de l' ter' Patria
Portos ili al la maro,
Eltombiĝos mi ja.
Lasos ĉion kaj al Dio
Portos mian pion,
Preĝos verve... Sed ĝis tio
Mi ne scias Dion!

Tombon faru kaj ekstaru,
Ŝiru ĉenan feron
Kaj aspergu per tirana
Sango la liberon!
Kaj en nova familio,
La libera, forta,
Ne forgesu rememori
Min per danko vorta!

...

Traduko de la ukraina poemo "Заповіт" de Тарас Григорьевич Шевченко *(∗1814-02-25 – †1861-02-26) en Esperanton de Ludmila Novikova.*

Arg-955-1934 (2014-01-04 16:34:27)